# VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku Klubu pracujících v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor - Dr. Josef Hradil, Mnichovo Hradiště 325
Cena: dobrovolný příspěvek
Povolil ONV Mladá Boleslav, odbor kultury čj. 145/74 -456/4

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

Decembro 1986 Numero 4 Číslo Prosinec 1986

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

<u>Markéta Procházková</u>

Eterna kanto

Vian standardon amo
senmakule
transportas la juno
tra jarcentoj
kaj levas plu
super la freneza mondo
vian eternan kanton.
Ĉar la homo
devas havi kuraĝon
respondi
al printempo per floro
al kampo per grajno
al vero per vero
al amo per amo
kaj al morto per vivo ….

Věčná píseň

Tvůj prapor lásko
bez poskvrny
pronáší mládí
staletími
a zvedá dál
nad šíleným světem
tvoji věčnou píseň.
Protože člověk
musí mít odvahu
odpovědět
jaru květem
poli zrnem
pravdě pravdou
lásce láskou
a smrti životem ….

(Esperantigis Jiří Kořínek el la kolekto Na prahu lásky – Sur sojlo de la amo, eldonis Fonto eldonejo, Brazilo.)
Markéta Procházková, juna ĉeĥa poetino favoras Esperanton. Pri ŝia infanaĝo antaŭ nelonge rakontis en kunveno de la literatura sekcio ŝia patrino.

EK MH 61/86

Mnichovo Hradiště - urbo de

Mnichovo Hradiště – město Jana Švermy

## JAN ŠVERMA

Li apartenas al la plej elstaraj kaj talentitaj reprezentantoj de la juna generacio de ĉeĥoslovakaj komunistoj, kiuj aliĝis (se přihlásili) al revolucia laborista partio sub influo de la Oktobra revolucio kaj de bataloj pri karaktero de la respubliko kaj partoprenis (zúčastnil se) ankaŭ dum fondo de Komunista partio ĉeĥoslovaka. Šverma estis komunista politikisto, teoriisto, parlamentano kaj ĵurnalisto de granda formato. De la jaro 1938 li estis agnoskata (uznáván) eĉ ekster vicoj de KPĈ kiel la konsekvenca (důsledný) antifaŝisto. Li respektinde viciĝas al ĉefaj personecoj de la internacia laborista kaj komunista movado (hnutí). Demonstra ekzemplo de liaj politikaj kvalitoj estas lia misio, kiun li plenumis kiel la reprezentanto de moskva gvidaco de KPĈ dum la slovaka nacia revolucio.

Hejme oni vokis lin Jenka. Li naskiĝis la 23an de marto 1901 en Mnichovo Hradiště, kie en unuetaĝa urbana domo proksime de la placo travivis 10 feliĉajn infanajn jarojn en familio de sia patro advokato Antonín Šverma. Urbestro de Hradiště, doktoro Antonín Šverma, patro de Jenka, subite mortas. Kaj la patrino decidiĝas (rozhoduje se) transloĝi al Prago. Jan nur malfacile kutimiĝas (zvyká si) al nova medio (prostředí). Li komencas studi en gimnazio – Smíchov. Li estis eksterordinare talentita kaj pripensema (přemýšlivý). I multe legas ĉeĥan klasikon, francan kaj rusan literaturon. Li ŝatas reveni en sian naskiĝurbon dum ferioj. En la jaro 1920 li finas studon de la gimnazio kaj aliĝas en la juristan fakultaton. Li akcentas inviton al kunveno de la marksista sciento – diskuta klubo de pragaj progresemaj altlernejanoj. En februaro 1921 estas inter la fondaj membroj de la Ligo de Komunista junularo -Komsomol-o. Kaj en majo de la sama jaro li aliĝas kiel 20jara studento en la tiam fondita KPĈ. Jam hejme en Mnichovo Hradiště altiris lin laborista junularo. Nun li ŝatus sisteme labori inter knaboj kaj knabinoj en fabrikoj. Post nelonge ligis la studenton kun laboristoj vera amikeco. Li trovis inter ili sian grandan vivo-amon Marie Švábová.

Jan Šverma estas elektita en la komitaton de Komsomol-o. Kiel reprezentanto de la junularo li partoprenas ankaŭ en kunvenoj de la plej supra partia organo – politika buroo de la centra komitato. Ĉi tie klera Šverma konfliktas kun tiama sekretario de KPĈ kamarado Jílek, al kiu li riproĉas (vytýká), ke la gvidado (vedení) de la partio estas senkoncepta. Por forigi opozician Šverma kamarado Jílek forsendas lin por studi dum du jaroj al Moskvo, kie estas nove enaŭgurita (otevřená, zahájená) lernejo de Lenin. En aprilo 1926 Šverma kun sia edzino forveturis al USSR. En la jaro 1928, dum la VI-a mondkongreso de Komunista Internacionalo en Moskvo, Jan Šverma intime interkonatiĝis kun K.Gottwald en tre grava situacio, kiam estis decidiĝate, en kiun direkton elpaŝos ilia partio. Ili kreas opozicion kontraŭ kamarado Jílek. Dum la V-a partia kongreso en la jaro 1929 estas Jan Šverma elektita en pli mallarĝan gvidadon (*užšího* vedení) de la kompartio. Li estas 28-jara. De tiu tempo li fariĝas (stává se) unu el la plej proksimaj kunlaborantoj de K.Gottwald kaj dum longaj tempoj ligas ilin firman amikeco. Komence de la jaro 1937 Šverma fariĝas ĉefredaktoro de Rudé Právo (Ruĝa Rajto) kaj baldaŭ li sukcesis amasigi vicon da talentitaj junaj ĵurnalistoj (Fučík, Urx, Roŝický k.a.).

EK MH 62/86

La 30-an de novembro 1938 la parlamentano Šverma lastan fojon voĉdonis (hlasuje) kontraŭ la elekto de Hácha kiel prezidenton. Ankoraŭ la saman tagon li forveturas en emigracion al Moskvo. Maje 1939 li forveturas kun Široký al Parizo por fondi eksterlandan sekretariejon de CK- KPĈ, kiu devos gvidi ĉeĥoslovakajn komunistojn en okcidenta emigracio. Post invado de faŝista Germanio en Francion, revenas Šverma laŭ ordono al Moskvo, kiel li venas fine de januaro 1940. Kiam hitlera Germanio invadis junie 1941 Sovetunion, komencis Šverma funkcii kiel gvidanto de ĉeĥa radioelsendado en Moskvo. Li estos ankaŭ komisiita sekretario de komunista Internacionalo por eksterlandaj rilatoj kaj estas unu el la malmultaj eksterlandaj funkciuloj, laborantaj en evakuita Moskvo. Tie, malsana, Šverma ankaŭ fosas traĉeojn (zákopy) kaj konstruas barikadojn. En majo 1943 revenas en Moskvon el malproksima Ufa K. Gottwald. Šverma kun Gottwald vizitadas la ĉeĥoslovakan militgrupon en Buzuluk kaj Novochopersk, ĉar en la moskva administrado li ankaŭ respondecis pri la politika laboro de ĉeĥoslovakaj militgrupoj en USSR.

Kiam en aŭgusto 1944 eksplodis nacia ribelio en Slovakio, estis decidita, ke Šverma forveturos en batalan Slovakion. Jan Šverma do post ses jaroj revenas en patrujon. Nokte la 28an de septembro surteriĝis (přistálo) aviadilo sur ribelian flughavenon Tri kverkoj. Ĉi nokte konvenas tuj Jan Šverma kaj Gustav Husák. Šverma post solaj kelkaj semajnoj fariĝas ŝatata kaj populara. Šverma rifuzas reflugi al Moskvo – kun aliaj kamaradoj li ekiras longan marŝon en montaron. Restas sola vojo – pretendema marŝo trans monto Chabanec. La 10an de novembro elĉerpita Jan Šverma sub pinto de tiu monto mortas.

La 3an de novembro 1945 estis korpore taĵoj de Šverma elfosigitaj kaj transportitaj al lia naskourbo Mnichovo Hradiště kaj la 11an de novembro li estis metitaj en familian tombon dům partopreno de tiamaj partiaj kaj ŝtataj funkciuloj.

La urbo Mnichovo Hradiště honorigis memoraĵon de sia elstara naskiĝdevenanto (rodák) per konstruo de lia Memorsalono enurba muzeo, kiun vizitas ĉiujare 7000 turistoj. Sur la placo staras monumento de Jan Šverma.

<u>Novaj finstudintoj de la koresponda kurso</u>:
Reichmanová Marie, 1965, 69612 Hovorany
Hejhalová Ivana, 1967, 33034 Úlice
Pejchl Daniel, 1952, 25754 Vojkov
Šourek Stanislav, 1951, 43111 Jirkov,
Ili estu bonvenigataj en nian verdan familion!

<u>T r a d u k a   k o n k u r s o</u>: Nun partoprenas 5 komencantoj, 9 pli spertaj komencantoj kaj 15 spertaj progresintaj esperantistoj, 14 personoj, kiuj partoprenas en la grupo de progresinto, ĉeestas jam trian jaron en la tradukado. Nur tiu ĉi fakto estas pruvo, ke la daŭra praktikado de la lingva internacia estas la ĝusta vojo al bona lingvoscio. La elekto de la lecionoj estas gradigita kaj ne faras malfacilaĵojn al la partoprenantoj. Aliĝu ĉe Zdeněk Řezáč, Vítězná 355, 46841 Tanvald. Se vi kunprenos dormosakon kaj grupe venos, li kapablas dum semajnfino gastigi per hejtigita litĉambro kaj aranĝos por la tuta grupo konversacian seminarion – sed nur post interkonsento!

EK MH 63/86

Nabídka esp. materiálů Čes.esperantský svaz, 11000 Praha 1, Jilská 10: odznaky – 5 druhů E SSSR 8. , plakáty 2,50, hvězdičky 4.-, jugoslávský, Třebíč, Lančov a` 6.-, veterana, ČSSR, KKEI, železničár. hvězda, medicina, trojúhelník, ryby a` 5.-, Mír obdélník 4.50, MEM 4.-, mineralogie 14.-, propisoty 27.-, pohled lázně 1.60, pohled ČES 1.60, igelit. Taška 2.50, nálepky lingvo 2.60, nálepky lingvo-granda 5.-, zažehl.obtisky E-o 3.-, vlaječka obdélník 15.-, dopisní papíry 20 ks 3.-, nálepky Eŭropa 1.30, taška 100 výročí 4.-, aršík hvězdičky 7.-, vlajka trojúhelník 13.50 Kčs.

Korekto: en VF Nro 2/86 ni publikigis informon pri Esperantujo en Italio. Pro ŝanĝo de telefon-numero ni korektas: Esperanto centro de laboro, kulturo kaj feriado, I-37010 Cavalcaselle (Verona) Italio, tel. (045)7551528.

40-jara jubileo de la E-klubo Třebíč estis solenata jam en propra domo, kie troviĝas klubejo, librejo, lernoĉambroj kaj bone ekipita tranoktejo. Dum multaj jaroj laboris brigade klubanoj por rekonstrui kaj ekipi ĉi tiun kulturan centron. Post la centro en Poprad ĝi estas jam la dua centro, kie povas esperantistoj trovi konvenan medion por siaj renkontiĝoj. Espereble ankaŭ la domo Bor u Tachova nun, kiam estas jam certigita faka renkostruo de la elektraj instalaĵoj ankaŭ progresos kaj ni havos la trian malgrandan esperantujon en nia ŝtato krom la someraj tendaroj.

LANĈOV: Aliĝu jam nun por la 35a esperanta somera tendaro en tri 14tagaj periodoj de 28.VI., 12.VII. kaj 26.VII.87. La tendaro en Lanĉov troviĝas en arbaro „Arĝenta golfo“ de Vranov-valbaraĵo. Ĝi estas moderne ekupita per kuirejo kaj lignaj kabanoj. 10 boatoj. Instruas konataj pedagogoj. Internacia partopreno. Informoj Esperanto klubo, 67401 Třebíč.

POR VIA SANO nomiĝas la prospekto informanta pri 11 niaj plej konataj banlokoj. Por viaj eksterlandaj amikoj petu ĝin ĉe Balnea, Pařížská 11, 11001 Praha 1. tel. 263777.

OLAF PALME – la nomon de elstara sveda politikisto, pacbatalanto kaj amiko de Esperanto, aldoni al sia nomo Esperanto klubo en Magdeburgo.

40leté jubileum E-klubu Třebíč bylo oslaveno již ve vlastním domě, kde se nalézá klubovna, knihovna, učebny a dobře vybavená noclehárna. Po mnoho let brigádnicky pracovali členové klubu, aby rekonstruovali a vybavili toto kulturní středisko. Po středisku v Popradu je to již druhé středisko, kde mohou esperantisté najít vhodné prostředí pro své schůzky. Doufejme, že také dům v Boru u Tachova nyní, kdy již byla zajištěna odborná elektrická rekonstrukce zařízení, také už pokročí a budeme mít tři malá Esperantuje v našem státě, kromě letních táborů.

LANČOV: Přihlaste se již nyní na 35. letní esperantský tábor ve třech etapách: od 28.VI., 12.VII. a 26.VII.1987. Tábor se nachází v lese ve „Stříbrné zátoce“ vracovské přehrady. Je moderně vybaven kuchyní, dřevěnými chatkami. 10 člunů. Vyučují známí pedagogové. Mezinárodní účast. Informace Esperantský klub, 67401 Třebíč.

Pro Vaše zdraví – se jmenuje prospekt informující o našich 11 nejznámějších lázních. Pro Vaše zahraniční přátele vyžádejte ho u Balney, Pařížská 11, tel.263777

Olaf PALME – jméno vynikajícího švédského politika, bojovníka za mír a přítele esperanta, přidal ke svému jménu E-klub v Magdeburgu.

EK MH 64/86

La 71a Universala kongreso en Pekino okazis de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1986 kaj estis la plej forta ekstereŭropa UKo en la historio kun partopreno de 2400 gesamideanoj. Intereso de araĝanta ŝtato montriĝis per partopreno de granda nombro da publikaj ĉinaj elstaruloj kaj diplomatoj. La kongreso estis malfermita per esperanta himno, kiun kantis 70 ĉinaj kaj bulgaraj esperantistoj en naciaj kostumoj. Gazetaro, filmo kaj televido dediĉis al la kongreso la plej grandan atenton. Pli ol 100 ĵurnalistoj de 48 agenturoj kaj redaktejoj referis pri la kongresa agado. Okazis kunvenoj de fakuloj – filologoj, kuracistoj, sciencistoj, verkistoj, fervojistoj kaj aliaj. En la internacia kongresa universitato partoprenis sciencistoj el Brazilo, Britanio, Ĉinio, Japanio, Jugoslavio, Pollando kaj Usono. Okazis ĉina nacia kaj arta programvespero kaj kantis ankaŭ la fama kanada kantistino Joelle Rabu, kiu preparas memstaran koncerton por la jubileo kongreso en Varsovio. Okazis multajn bankedoj kaj baloj. Kutima ekskurso havis ĉifoje nekutima aspekton: Ĉiuj partoprenantoj veturis al la sama loko: al la Granda Muro. Vico da aŭtobusoj veturis tra pekinaj matenaj stratoj kaj akompana teĉmento da policistoj antaŭ la transporto haltigis la tutan trafikon kaj urbajn veturilojn. Kaj dank` al eksterordinare bela vetero povis la partoprenintoj observi la Grandan ĉinan muron kun ĝiaj bastionoj, kiel ĝi pletiĝas inter montoj – ĝi estis neforgesebla travivaĵo. La grava kunveno okazis ankoraŭ antaŭ la Kongreso: Internacia akademia konferenco pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko kun partopreno de kelkaj centoj de fakuloj. Dum la kongreso estis elektita nova estraro de UEA: la nova prezidanto estas post sesjara paŭzo univ. prof. Humprey Tenkin (Usono), la vicprezidanto estas Dro Y.Umeda (Japanio).

Se vi volas partopreni en la Jubilea Kongreso en Varsovio 1987 sendu provizoran aliĝilon al Ĉeĥa esperanta asocio. Versimile veturos pere de Čedok nuraj 200 homoj. Kvankam la kondiĉoj ne estas konataj, veturas versimile nur 200 homoj, avantaĝe estos akceptitaj la dumvivaj membroj.
Antaŭ la jubilea jaro – varbu novajn lernantojn, propagandu nian lingvon. La plej novaj faktojn vi povas trovi en la intervjuo kun s-ano Jiří Kořínek, nia granda poeto, kiu parolis pri Esperanto en la matena serialo (Kaj la jaroj pasas, estimataj – A léta běží, vážení …), kiun surbendigis nia magnetofona servo: skribu al Josef Filip, Nádražní 146 ČSD, 76811 Chropyně. Li povas kopii sur vian kasedon.

Sekcio de handikapuloj sciigis nin, ke estis elektita la nova prezidantino. Ŝi estas Olga Nováková, Foerstrova 13, 77900 Olomouc. La sekretario restas s-ano Josef Vaněček, poste restante pošto 9, 77900 Olomouc.

Ĉu vi jam aliĝis el nia asocio? En la jubilea jaro aliĝu al nia asocio. Se vi jam pli frue aliĝis, fariĝu dum-viva membro! Tial vi aktive helpos al nia asocio propagandi lingvon, presi instruilojn.

Sekce invalidů nám oznámila, že byla volena nová předsedkyně. Je jí s-anino Olga Nováková, Foerstrova 13, 77900 Olomouc. Jednatelem zůstává s-ano Josef Vaněček, poste restante pošta 9, 77900 Olomouc.

Už jste se přihlásil(a) do našeho svazu? V jubilejním roce přihlašte se do našeho svazu. Jestliže jste se už přihlásili dříve, staň se doživotním členem. Tak pomůžete našemu svazu propagovat jazyk, tisknout učební pomůcky.

EK MH 65/86

Terminologia kurso: 1986-09-01/05 estis en Roudnice nL aranĝita terminologia kurso de scieno-teknika sekcio de ĈEA. Partoprenis en ĝi entute 27 ĉeestantaj (přítomných), el tio 4 germanoj el GDR, 3 hungaroj, 1 bulgaro kaj 1 italo. Eminente prelegis Dro Blanke, Dro Spitz, Dro Kavka kaj Inĝ Werner, kompilanto de meritplena baza verko: terminologia kurso. Celo de tiu kurso estis doni bazajn terminologiajn konojn al tiuj, kiu okupiĝas (zabývají se) pri kreado de fakaj terminoj. Ĉiuj prelegoj kaj vesperaj diskutoj ĉirkaŭ la ronda tablo okazis en la Sindikata klubo en Roudnice nL, kiu kreis por tio vere agrablan medion. Posttagmeze estis aranĝitaj ekskursoj al Říp, Terezín kaj trarigardo do la urbo. Ĉie estis gvidanto senlaca kaj ĉionscia (neúnavný, vševědoucí) s-ro Laube, sekretario de STS de ĈEA kaj granda patrioto de sia urbo. La kurso estis alte taksita de ĉiuj partoprenintoj kaj flanke de hungaro I.Bujdosó estis esprimita miro super la granda progreso de terminologiaj laboroj en Ĉeĥoslovakio. De ĉiuj estis ankaŭ esprimita deziro ripeti tian kurson (kompreneble el alia vidpunkto) (hlediska). Tiuj, kiuj interesiĝas pro terminologiaj problemoj povas mendi la libron de inĝ. Werner ĉe ĈEA, 11000 Praha 1, Jílská 10.

Vintra renkontiĝo en Mnichovo Hradiště estis aranĝita de la klubo la 13an de decembro. Partoprenis en ĝi 11 parolantaj esperantistoj, kiuj en sola temo de la renkontiĝo referis pri siaj laboro, opinioj. Estis aranĝita malgraŭ enketo, kiun ni antaŭmetas por niaj legantoj. Ĝenerale estis esprimita kontenteco pri stabiligo de la agado de nia asocio. La renkontiĝo sekvis ideon proponi okazon por esperantlingva parolo kaj konatiĝo kun movadaj samtempaĵoj.

E N K E T O de Verda Familio: Afable respondu sekvajn demandojn kaj sendu ĝis fino de februaro al nia klubo (aŭ subskribite aŭ anonime):

1. Kial dum 100 jaroj Eo ne pli disvastiĝis (via opinio)
2. Kio devas pliboniĝi?
3. Kiel vi mem por tio kontribuos?

Ekologia esperantista grupo ekfunkciis - pri informoj skribu al Aqulika, , Čs. svaz ochránců přírody, Miroslav Tenčl, Všehrdova 6, 11800 Praha 1.

En PARDUBICE okazos tradicia oka RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ/ PACDEFENDANTOJ de la 20-a ĝis 22a de marto 1987. Programo: Vendredo: Akcepto en urbodomo. Vizito de memorloko Zámeček. Vizito de iu entrepreno. Kulturprogramo vespera. - Sabato: Solena kunsido. Pacdialogoj. Amika dancvespero kun tombolo. Dimanĉo: Aŭtobusa ekskurso al Ležáky kaj al Žleby. Prezo 195 Kčs inkluzivas (zahrnuje) loĝadon en studenta hejmo, 2 vespermanĝojn, 2 tagmanĝojn, 2 matenmanĝojn, kotizon (org.příspěvek). Aliĝu ĝis 15.II.87 ĉe Milada Hemerková, Wolkerova 2071, 53002 Pardubice. Se vi deziros loĝi en hotelo, pagu 265 Kčs. Petu aliĝilon.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri psikoenergiaj problemoj (vidu Signal 49/86) povas renkontiĝi kun univ. prof.Dro Forejt en Poděbrady. Termino en printempo laŭ interkonsento.

Pardonpeto de la redaktoro. Mi petas, tiujn, kiun sendis al mi finjarajn bondezirojn, ke mi ne ofendiĝu, se mi elektas tiun manieren por dankesprimo. Mi ĝojas, se mi sukcesis almenaŭ iom enkonduki atmosferon de sento por esperantistoj, ke ili ne estas solaj kun iliaj opinioj kaj zorgoj. Multaj skribas pri gravaj sociaj fenomenoj, pri iliaj sanproblemoj. Mi ne povas lasi tiujn leterojn senatente. Sed al pli multo mi ne povas aliel, nur tiamaniere danki kaj espri mian personan deziron de sano kaj vivkontento en la nova jaro 1987! Estu la jubilea jaro favora por nia agado!

Kiel diri? Lentaigne. Bestoj.

ŜAFO: Ŝafa lakto, fromaĝo, lano. Milda kiel ŝafo. Rigardaĉi kiel ŝafo. Iri kiel la ŝafoj de panurgo (senorde). Kiel anaro da ŝafoj post la kriemuloj (sekvi la antaŭirantojn). Ili estas blindaj kiel ŝafoj. Paŝtu viajn ŝafojn. Grego (stádo).

SCIURO (veverka): Hejmigi (ochočit) sciuron, mungoton (serpento-mortiganta malgranda mamulo).

URSO: Antaŭ mortigi urson, ne vendu ĝian felon.

VULPO: Eĉ plej ruza (lstivá) falas en kaptilon.

KOKO: Metas, demetas, ellasas ovojn. Beki (zobat) grajnojn. Brogi (opařit) kokidon (por pli facile ĝin senplumigi (oškubat).

HIRUNDO: Unu hirundo printempon ne aportas.

ABELO: Zumas. Reĝino, virabelo, virinabelo. Kolonio da abeloj. Pikilo. Abela diligenteco. La mirinda instinkto de abelo. Senso de orientiĝo. Esameno (roj). Edukado de abeloj. Bredi abelojn. Nektaro. Miela ĉelaro (plást). Ĉeloj el vakso. Abelkesto. Operkulo (voskový závěr buněk). En abelujon ne blovu. Abelujon ne incitu, amason ne spitu (nevzdoruj). Propoliso. Vespo (vosa). Krabro (sršeň). Burdo (čmelák). Meti la manon en vesponeston. Talio (linie těla) kiel vespo. Nugato (karamelo plus migdaloj plus pistakoj). Mielkuko. Lango miela, sed koro kruela. Miela tempo (unua tempo post geedziĝoj).

Juliana M e n d o v á , meritplena longjara membrino kaj regula vizitantino de la praga klubo, elstara esperantistino, modesta samideanino, kies kvalitoj konis nur ŝiaj proksimuloj, konatino de orienta filozofio, pacifistino kaj propagandistino de bahaismo, loĝantino de Praha-Nusle, en la aĝo de 88 jaroj same kviete, kiel ŝi vivis, forpasis. De ŝiaj amikoj ŝi estos neniam forgesita!

Esperanto-klubo „Norda Stalo“ SU-663305 Norilsk, ul. Zenina 9 serĉas kor. amikojn, precipe *por* Žuĉkova Olesja, 15j tm pri sporto, literaturo, m kaj por Pomcinova Ĵanna (16j) pri literaturo, m, sporto kaj aliaj temoj.
Junulara Klubo de Tutmonda Amikeco, liceo Vassalli Tal-Handag, Quormi, Malta dez kor pri ĉt kun tm
S-ro H.Bakker, Kastellenstraat 231, 1082 Amsterdam, Nederlando daŭre serĉas korespondamikojn por siaj lernantoj de E-o en Afriko-liveras adresojn.
Belajn tagojn dum la tuta jaro en E-medio vi travivos en Poprad. Tranoktejo 25 Kčs po tage. SEA, Sobotské nám 6, 05801 Poprad, tel. 26895.
Kiom da esperantistoj estas en la mondo? Sendu vian adreson al Universala Esperantistaro, AGA, PK 13, E-Torrox (Malaga), Hispanio.
Tendumejo Ea en pitoreska loko, unika panoramo ĉe landlimo CH, A, D sen anonco venu kampadi ĉe Hans Kästli, Sonnenhejm, CH-9424 Rheineck.
Lerneja klubo „Unu mondo“ respondos ĉiujn salukartojn. Reading School, Anglio RG1 5LW
Ekslibrisoj itŝ aŭ aĉetas s-ro Bruggeman, Dikkebeuklaan 22/133, B-1090 Bruselo
Aijeltt, Cenowa Batai, Wugang Qu, Pingdingshan, Henan, Ĉinio, 25j kamparano pri ĉt.
Mayoma-Diankembo, B.P.152, Kinshasa, Zairio itŝ kasedojn kun E-kantoj kontraŭ propra E-kantoj surkasedigitaj. 26J, dez kor pri ĉt.
Junulara grupo, Ingo Fisher, Ho-Ch-Minh Str.19/B, 2 Etage 0204 Berlin DDR-1156 aranĝos letervesperon – petas salutleterojn kaj E-aĵojn, resp. garantita
Arnaldo Aguila, A 451 (ler Piso) el 19y21, Vedado, C.de Habana, Kubo, verkisto-tradukisto dez kor pri scienc-fikciaj temoj.
Iranaj gefraŭloj dez kor tm POBox 3563, 91375 Meshed, Irano
Yu Rongkang, Shashi Ni 1 Textile Eqŭipment Plant, Shashi Hubei, Ĉinio 26j fraŭlo kun tm pri historio, sporto, literaturo.

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

LASTMOMENTE: XVa printempa pacmarŝo en Jablonec okazos la 18an de aprilo 1987 (paska sabato) kun internacia partopreno. Inf: E-klubo KASS PS 190 46621 Jablonec nNisou. Kultura vespero! Nepre aliĝu tuj!

xmxmxmxmx
xmxmx
xmx
x

Esperantský klub
29501 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka
Presaĵo
Imprimé

EK MH 66/56